

OMAGĖ AL HENRI MICARD

Tute speciala numero estas tiu ĉi. Ĝin ni decidis dediĉi al eminenta esperantisto, kies senĉesa laboro alportis al la gesamideanoj unikaĵon.

Kial speciala numero ?

Granda parto el la nuntempaj administrantoj de la Esperantista Kulturdomo travivis la naskiĝon de la asocio, kaj atente, preskaŭ ĉiutage sekvis la traktadoj pri akiro de Esperanto-Domo. Ili tute konscias, ke nur viro eminenta povis atingi tian realigon. Sekvante paŝon post paŝo lian laboron ili admiris lin. Ili ne ĉiam aprobis liajn decidojn sed poste konstatis, ke li pravis. Ili bone scias, ke plurfoje Micard elektis la plej malfacilan vojon ĉar li konsciis, ke nur tiun vojon kondukis al la celo. Li eĉ estis devigata fari decidojn kontraŭ amikoj kvankam tio ĉagrinis lin. En tiaj okazoj li estis tiom emocii-ta, ke li iĝis malsaneta. Ankaŭ pro tiuj manifestadoj de lia sentoplena karaktero liaj kunlaborantoj ŝatis lin. Ili ŝuldas al li tiun publikan omaĝon.

Kiam ili legis pri la morto de Henri Micard per la du-tri linioj aperintaj en la internaciaj revuoj, multaj esperantistoj pensis : « Henri Micard ? La fondinto de la Esperantista Kulturdomo ? Jes, granda perdo ». Tiuj du aŭ tri linioj ne povis inspiri pli al ili. Ĉar du-tri linioj ne sufiĉas por doni al la esperantistaro ideon pri la grandeco de la viro mortinta, la grandeco de liaj realigoj, la grandeco de la perdo spertita. Tion konsciis multaj, kiuj konis ne nur la kreaĵon sed ankaŭ la kreadon kaj la kreinton. Ili sentis, ke tia homo meritis pli ol mallonga anonceto. Henri Micard neniam trumpetadis pri siaj faroj. Li ankaŭ ne trumpetadis pri la Esperantista Kulturdomo, nur informante pri kio ĝi estas, kion ĝi proponas, sen blufi. Ŝajnis necese al ĉiuj, kiuj ĝuste taksis lian agadon, informi ĉiujn pri la aginto, sen trumpetadoj sed ankaŭ sen malsincera pudoro. La tuta esperantistaro ŝuldas al Henri Micard tiun omaĝon.

P. BABIN

Prezidanto de E.K.D.